

# Gazeto Andaluizia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO



13a Jarkolekto

\*

Marto, 1996

N-ro 45



*Jean Raymond*

POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

## GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

Efika Esperantismo / 12	3
Intervjuo al samideano Luis Serrano	5
Rok-Gazel'	8
Beletra Konkurso	10
$e=mc^2$	11
Krucvortenigmo	12
Poezia angulo	15
Lingva angulo: la akuzativo	16
10 sciindaj aspektoj pri Esperanto	17
kaj la kino	17
Paĝoj de nia Historio	19
Radioamatora angulo	20
La lingvo en la hispana politiko	22
Esperanto Aplikata	24



## Efika Esperantismo / 12

Ni jam troviĝas ĉe la sojlo de la tria jarmilo. Kvankam la estonteco ne estas antaŭvidebla kaj la prognozoj preskaŭ ĉiam eraras, en ĝeneralaj trajtoj oni povas iom intui la trajtojn de la venonta dudekunua jarcento. Tamen ni povas unue iom fantazii pri la malproksima estonteco. Se neniuj kataklismo, kiel atom-nuklea milito, agado de la propra homo, ne detruas la homaron, ni image povas prognozi pri la futura estonteco. Post dekmil jaroj, eble jam ne ekzistos homaj rasoj, la etnaj lingvoj formortos, la nacioj ankaŭ ne ekzistos. Okaze, kiel lingvo planeda povos ekzisti ĵargono, stranga kaj komplika parolilo kaj skribo, se antaŭe ne adoptis Esperanton, ne kiel internacia, ne kiel supernacia, sed kiel planeda. Pri la scienco kaj tekniko, post dekmil jaroj, se la socio evoluos tiel same rapide kiel en la naŭdeka kaj dudeka jarcentoj, jam estas nekomceptebla por ni. Tio plej evidenta estas, ke la tiama estonta homaro devos funkcii unuigita, esti klera, morale altkvalita, solidara kaj eĉ la homa menso devos regi la ekvilibron de la naturo. Se nun la mondo jam estas unu granda vilaĝo, tiam devos esti la komuna hejmo.

Ni delasas tiun cerbumadon kaj atentis pri la proksima jarcento. Pli frue aŭ malfrue estos necese forigi la artifikajn landlimojn, kaj ne nur permesi, sed eĉ favori la liberan cirkuladon de aĵoj, homoj kaj ideoj. La etnaj apartiĝoj laŭ etnaj lingvoj, la etnaj ŝtatoj, sen miksiĝo de lingvoj kaj sen miksiĝo de etnoj aŭ gentoj devos esti forigita. Celi konservi la etnajn lingvojn kaj deziri por ĉiu etno propran ŝtaton estas reakcia penso, estas retroiri al la pasinteco, tiu idealigita pasinteco de la romantikismo, kiu neniam ekzistis. Per tia teniĝo, prospera estonteco estos neebla.

Tiel same la etna izoliĝo kiel la individua izoliĝo kondukas al netoleremo, integrismoj kaj razismoj. Pro la naciismo nia dudeka jarcento suferis du mondmilitoj kaj eĉ nun la naciismo semas militojn kaj terorismojn. Bonvole aŭ eĉ malgraŭvole por multaj, la venonta jarcento devas firmigi la toleremon. Neniu posedas la unikan grandan veron. La sociaj kaj socialaj aferoj estas tiel kompleksaj, ke nenia simpla ideologio povas pretendi havi la veron por ĉiuj kaj por ĉiam. La revoluciuloj, kiuj volis ŝanĝi el radiko la tutan socion kaj alporti por ĉiam kaj por ĉiu justecon kaj feliĉon generis pli da suferoj kaj tragedioj ol la ekzistantaj. Perfortaj revolucioj solvos nenion. Ne estas la institucioj, kiuj kulpas pri maljusteco, laŭ la kvalitoj aŭ difektoj de la homoj fariĝas la institucioj. La institucioj perfektigas laŭ la perfektigo de tiuj, kiuj konsistigas ilin. Tamen, la toleremo ne sufiĉas. Laŭ PIV toleri estas: "ne kontraŭstari al io, kion oni ne aprobas aŭ kio malplaĉas aŭ



suferigas." La toleremo estas multo rilate integrismojn kaj fanatikecojn, sed malmulte rilate kunvivado. La toleremo ebligas la kunestadon. Unuj toleras la aliajn, sed ĉiu aparte, kaj tio ne estas kunvivado.

Nuntempe oni kunestas laŭ ŝtatoj kaj al multaj ŝajnas, ke nur estas eble kunvivi laŭ samlingvaj etnoj. La etnisma naciismo ne agnoskas la divergentajn kaj diverlingvajn kunvivado. La etnismo estas izoliga faktoro kaj fakte reakcia. Tio grava por la estonta kunvivado de la homaro ne estas revivigi ruiniĝintajn dialektojn kaj lingvojn, sed entrepreni la disvastigon de mondlingvo.

Tia lingvo estas Esperanto. Planeda lingvo por homara kunvivado. Tio necesa por la estonteco estas forlasi la pasintajn obstaklojn, kiuj estas la lingva diverseco, la ŝtataj landlimoj, kaj ĉiuj integrismoj kaj fanatikecoj.

Nova erao en unuigita homaro pli ol tolerema teniĝo necesigas la emon dialogi aŭ komprenemon. Por tiu dialogo ekzistas la supernacia Esperanto kaj per tiu teniĝo la esperantismo povas kaj devas enkonduki novan eraon en la disvolvigo de la homaro.

GIORDANO MOYA

\*\*\*\*\*

*[Daŭrigo de la paĝo 19]*

la kongreso de Antverpeno. Okazis do, en la andaluza marĝo, la plej kurioza kaj kriema konversacio en la unuaj jaroj de la internacia lingvo Esperanto.

Ĉi konitaĵojn ni povas oferi al Vi dank'al la ekzisto de la Arĥivo de AEU, kie ni pretendas gardi ĉion rilatan al la Esperanto-Movado en Andaluzio. Verŝajne ni tro pretende nomas tiun sektion *Arĥivo*, malgraŭ la fakto, ke ĝi estas nur kolekto de antikvaj ĵurnaloj kaj esperantaĵoj. Tamen, ni volas krei veran arĥivon, la arĥivo de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj E-revuo aŭ esperantaĵoj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bv. kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU  
POŝTEKSTO 611  
E-14080 KORDOVO.



## Intervjuo

Andreo Martín intervjuis nian samideanon kaj daŭran kunlaboranton de *Gazeto Andaluza*, s-ro Luis Serrano. Jen mallongigita versio:

GA: S-ro Serrano, de kiam vi aktivis en la Esperanta Movado?

LS: Mia kontakto kun Esperanto okazis en la jaro 1956. Mi naskiĝis en vilaĝo Osorno (Palencia), kie mi estis feliĉa, sed mi sentis min kvazaŭ enkaĝigita. Iam mi legis informojn pri Kongreso de Esperanto kaj adreson de HEF en Valencio. La rezulto estis, ke post tri monatoj mi eklernis (ankoraŭ mi ĝin lernas) Esperanton per korespondado de s-ro R. Molera. Ĝuste kiam mi estis trimonata lernanto venis al mia vilaĝo sperta kaj juna esperantisto, s-rano J. Mabesoone, kiu faris sian tezon pri paleontologio. Bonega rimedo ĝi estis, ĉar vole nevole, bone malbone, mi estis devigata paroli esperante.

Poste mi translokiĝis por labori en Gijón, kie mi helpis la aktivulojn de ties grupo. De tiu astura urbo mi iris al Germanujo, kie mi kontaktis la esperantistojn en Kolonjo. De ĉi tiu germana urbo mi iris al Tours (Francujo). Loĝante tie mi ekkorespondis kun fraŭlino el Sabadell, kvazaŭ mi estis franco, kvankam baldaŭ mi malkovris la veron. Post jaro kaj duono ni geedziĝis, kaj mi revenis en Hispanujon.

Ekde mia alveno en Sabadell (1963), mi estis kaj ankoraŭ estas

aktiva membro de la loka movado, nun en Kultura Esperantista Asocio (KAE).

GA: Poste, kompreneble, tre ŝanĝiĝis la mondo. Laŭ via kompreno, kiel adaptis sin la Movado al sociaj, politikaj, ktp. sinsekvaj situacioj?

LS: La mondo multe ŝanĝiĝis, sed nur ekstere: la rilatoj inter la homoj restas senmovaj, senŝanĝaj. Estas iuj, kiuj laboras, estas aliaj kiuj ĝuas la profiton de tiu laboro. Jes, nuntempe oni ornamas la situacion per aliaj plej delikataj vortoj, legu mensogojn!

Ĝi ne sciis adaptiĝi al tiuj ŝanĝoj *eksteraj*. La Esperanto-Movado restas enfermita en si mem, dormante trankvile kun sia interna ideo.

Ni enfermiĝas en niaj grupoj, ni diskutadas eterne pri gramatikaĵoj, ni fanfaronas kaj mensogas pri niaj sukcesoj, kaj dume en la mondo la ĉaro aŭ trajno de la progreso trairas apud ni, kaj ni ne scias envagoniĝi en tiu trajno, en tiu progreso.

Multaj esperantistoj restas enfermitaj en la opinio, ke Esperanto estas io supera, io speciala, por specialaj homoj kaj en niaj grupoj oni parolas konstante (preskaŭ ĉiam neesperante) pri la facileco de la lingvo, la interna ideo, kaj la granda rolo, kiun havos estonte la Esperanto-



Movado. Intertempe ni ne kapablas interesigi la regantajn instancojn de nia vivo.

GA: Per *Gazeto Andaluza*, AEU celas inter alie konsciigi pri la nepreco uzi Esperanton profitele ankaŭ en la ekonomia kampo. Ĉu tio vere necesas, taŭgas, utilas, maleblas? Kial?

LS: La vivo en si mem konsistas el multaj eroj, inter ili la lingva, kaj en tiu lingva tereno Esperanto havas gravan rolon farendan. Sed mi ripetas nur lingvan. La lingva fraoso nuntempe estas grandega, la superregado de iuj lingvoj donas avantaĝojn en la komercaj interkonsentoj. Esperanto oficialigita metus ĉiun lingvon en ĝian ĝustan lokon. Aliflanke ekzistas la opinio, ke Esperanto ne estas akceptata, pro la fakto, ke *ĝi ne donas monon*, kaj tio ankaŭ estas vero. Do, eltiri profiton ekonomian, pere aŭ uzante Esperanton, respondas al la logiko, en kiu malvolviĝas nia socio. Mi scias, ke restas la skeptikuloj, bonakoraj gesamideanoj, por kiuj Esperanto estas io tiom supera, ke ĝi devas resti for de la malpuraĵoj de ĉi tiu mondo. Bedaŭrinde mi ne estas negociisto, eĉ ne negociema mi estas, kaj tiucele mi ne scias aŭ ne kapablas profiti Esperanton.

GA: Turismo, E-Kulturo, fanfaronado, amatoreco, studo, kio karakterizas la renkontiĝojn de la esperantistoj?

LS: La turismo estas ĝis nun la vera celo de la Esperanto-Movado. Tio signifas, ke por tiuj, kiuj ne povas

turismumi, la intereso por Esperanto malgrandiĝas aŭ perdiĝas. Prezenti Esperanton kiel ilon por turismumado estas malaprezi la veran rolon de Esperanto en nia ĉiutaga vivo.

Kulturo jes, Esperanto povas revoluciigi la kulturon, sed ne pro la fakto, ke Esperanto havas apartan aŭ specialan kulturon, sed pro la realo, ke pere de Esperanto oni povas kunligi aŭ interkonatigi multajn aŭ ĉiujn kulturojn.

Pri fanfaronado, ni estas majstroj. La mensogoj pri partoprenantoj en la kursoj. La nombro de ĉeestantoj al la renkontiĝoj. La fotoj pri kongresoj, renkontiĝoj, en kiu aperas malgranda nombro de esperantistoj, kun la aldono *parto el la partoprenantoj*. La milionoj da esperanto-parolantoj.

Renkontiĝoj, kongresoj. Por la plej granda parto de la partoprenantoj, la Esperantaj eventoj havas nenian intereson. Ili iras tie, kiel turistoj, multaj el tiuj partoprenantoj ne scias eĉ unu Esperantan vorton. Kvankam vero estas, ke ankaŭ ekzistas minoritato de Esperantistoj, kiu fervore kaj entuziasme ĉeestas tiujn Esperantajn aranĝojn.

Pri la kongresoj de UEA, tute simple signifas, ke tie kunvenas personoj, esperantistoj aŭ ne, kiuj havas monon por tien iri. Granda parto de la movado restadas diskriminaciata.

GA: Kiugrade tio konvenas al la Movado?

LS: Kompreneble, neniagrade, sed, kiel tion ŝanĝi? Ĉu por Esperanto la



esperantistoj devas ŝanĝi sian tradician kulturon? Tio ja estas bonega kaj por Esperanto kaj por la socio. Sed mi multe timas, ke tio ne okazos. Tiusence la evoluo de la E-Movado iros paralele kun la evoluo de la socio en kiu ni vivas. La E-Movado ne posedas magiajn povojn por ŝanĝi la socion, ne estas ĝia celo tion fari.

GA: Skize, kion oni povas fari hodiaŭ por allogi la laboristojn?

LS: Evidente, la nuna laborista E-Movado apenaŭ ekzistas, aŭ ne ekzistas. La plej granda parto de laboristoj esperantistaj ne interesiĝas pri movado laborista. La realo estas, ke la laboristoj, almenaŭ en Hispanujo, aparte de la futbolo, sin interesas pri nenio, eĉ en multaj kazoj ne interesiĝas pri tiuj problemoj sociaj kiuj tuŝas ilin. Ĉu vi pensas, ke ili interesiĝos pri Esperanto? Kion oni povas fari por ilin allogi? Se nia ĉiutaga vivo ne evoluas al aliaj progresemaj idealoj, nia E-movado restos en tiu situacio, kiun determinas la nuna moderna vivosistemo.

GA: Verki en Esperanto estas necese. Legi esperantaĵojn tre utilas. Tamen, laŭ mia kompreno, abundas beletraĵoj dum maloftas verkoj kiuj analizu la sociologiajn aspektojn de la Movado, kvankam Esperanto denaske estas lingvo por homamasoj. Kion vi opinias tiurilate?

LS: Verki en Esperanto estas urĝe kaj necese. La literaturo estas la biblioteko de ĉiu lingvo. Abundas

beletraĵoj, precipe poeziaĵoj, kiuj estas malfacile kompreneblaj, kun strangaj kunmetitaj vortoj, sen ritmo nek rimo,, kiuj aparte de tre malgranda elito de nia movado, havas nenian signifon por la plej granda parto de esperantistoj.

Jes, mankas sociologia literaturo. Tio montras, ke mankas fortoj Esperantaj en tiuj movadoj de nia vivo. Eĉ mankas artikoloj, por evidenti, ke Esperanto ne estas la lingvo de *bonan nokton* aŭ *kia vetero estas?*. Estas necese montri la gravan rolon, kiun povus havi la lingvo en la laborista movado. Nia movado nuntempe konsistas el intelektuloj, instruistoj, oficistoj kiuj multaj (eble ne ĉiuj) sin sentas for de la laborista movado. Kion oni devas fari? La rimedo estas organizado, organizado, laborado kaj laborado. GA: Inter ni iuj pensas ke Esperanto, kunportas propran idearon. Aliaj ne konsentas. Kaj vi?

LS: Jes, por multaj esperantistoj, Esperanto estas io pli ol lingvo. Tiu opinio naskiĝis en la unuaj tempoj de la E-Movado. Pli supre mi jam klarigis, ke en tiu epoko, la iluzio kaj la espero invadis la koron de la homoj per idealismaj projektoj. Hodiaŭ ankoraŭ restas samideanoj (preskaŭ ĉiuj maljunaj) defendantaj la internan ideon, idealojn belajn, bonajn, apogindajn kaj indajn sed nerealegeblajn *nur per la lingvo aŭ Esperanta-Movado*. Diri: "La esperantismo alportos la feliĉon al la

*(Daŭrigo sur la paĝo 21)*



## Recenzo

# ROK- gazet'

Al nia redakcio alvenis antaŭ nelonge ekzemplero de *Rok-gazet'* (Esperanto-Muzik-Magazino), de la numero 7. Temas pri revuo grandformata (kaj pro la paperformato kaj pro la paĝonombro), bele presita (kun fotoj kaj bonkvalitaj grafikaĵoj, eĉ se nur blankanigraj), eldonita de *Eurokka*. EUROKKA ekis en 1988 kaj de 1991 ĝi iĝis fakasocio de TEJO. Ties celo estas, pere de sia diskeldonejo (*Vinilkosmo*), prezenti la variegan gamon de bandoj kaj artistoj kiuj kantas en Esperanto. EUROKKA fakte estas grava helpo por la evoluigo de muzik-Esperanta lingvaĵo kaj kulturo. Pri la lingvaĵo, ĉio en *Rok-gazet'* temas pri muziko, moderna kaj ne tiom moderna. Dise en la artikoloj oni legas vortojn kiel *skao*, *fazo*, *reĝeo*, *funko*, *hardkoro*, *sekvencilo*... Krome, legeblas sekcio nomita *Instrumentoj kaj aliaj iloj* kiu fakte estas tria ero de *Muzikterminaro*,

vortareto de muzikaj vortoj, prilaborita de Bertilo Wennergren (iama ano de *Amplifiki* kaj nuna drumludisto de *Persone*, kiu ankaŭ verkis Esperantan gramatikon eldonotan, nun konsulteblan nur *Internet-e*). Aliaj artikoloj samtemaj estas *Pri la superreĝo de la angla en Rokenrollo*; *Ĉu valoras la penon eldoni en Esperanto*; *Papagoj*. Pri la E-a muzika kulturo, memoru ke EUROKKA eldonis *Vinilkosmo-Kompil'*. Vol. 1., kompaktdiske kaj kasede (krome, EUROKKA jam akceptas antaŭmendojn por la dua volumo). Pri kio oni povas legi? Nu, *Midi-lando* estas artikolo de ONO Takao pri tiuj malmultekostaj ekipaĵoj, miksiloj (t.e., aparatoj kiuj ricevas sonon en pluraj kanaloj kaj kunmiksas ilin en unu/du); en *Kritikoj* ni ricevas raportojn pri diversaj grupoj (*Piĉismo*, *Samarkand'*, *Jadwiga*, *Solo*...)... *Malkovrindaĵoj* temas ekzakte pri tio, pri grupoj malkovritaj kaj



recenzitaj de la redaktistaro. *Espop-bandoj* alportas intervjuon kun *Luanda Cazetti*, brazila kantistino kiu kantas en diversaj lingvoj (inter ili, Esperanto). Tiu ne estas la sola intervjuo de la revuo, kiu ofertas alian intervjuon al *Piĉismo*. Anna Löwenstein verkis interesegan du-paĝan recenzon pri libro de George Martin, la aranĝisto de *The Beatles*.

Ĉu tio estas ĉio? Tute nel Ni povas legi pri *Malrok-muziko*: ekzemple, en la *Afrika muzik-angulo* (kies temo memvideblas) kaj en *Malrok-muziko* (pri inkaa muziko, oratorio esperantlingva, angla ĥoro, fraŭlino Barlaston...). Kaj Aldo de' Giorgi informas nin pri ĵazmuziko en *Jazaĵoj*.

Krome (jes, ankoraŭ mankas legaĵoj komentendaj) la redaktistaro aperigas artikolon pri (aŭ pli ĝuste, kontraŭ) la naziaj rokbandoj, la tiel nomitaj

*razkapuloj* (inkluzive de listo de bojkototaj naziaj rokbandoj); alian sekcion pri songazetoj, alian pri radio-aktivado esperantlingva, alian (*Haste-Klaĉe*) pri novaĵetoj esperantaj, muzikaj kaj esperant-muzikaj, alian de anoncetoj kaj fine, *Korespondi deziras*...

44 paĝoj (A4-formataj) plenplenaj de interesegaj muzik-novaĵoj. Ĉiu esperanta muzikŝatanto devus legi ĝin. Kaj kunlabori: eblas kunlabori havigante informojn, aĉetante *Vinilkosmajn* diskojn aŭ, plej simple, abonante *Rok-Gazet'-on*. Abono kostas 100 francajn frankojn (sed se vi volas pliajn informojn, turnu vin al la hispana peranto, Nikolao Gill, Poŝtako 305, 24080 LEÓN).

Bedaŭrinde la aperritmo estas nur unujara: kompreneble la volumo de laboro necesa por pretigi tiun revuon estas grandega (kiel volonte atestos la redakcio de *Gazeto Andaluza*), kaj ŝajne mankas laborfortoj (nun vakas la posteno de ĉefredaktoro).

Fine, kun la revuo oni povas legi apartan *Specialan Dosieron* pri *Vinilkosmo-Kompil'*. Vol. 1., plurlingvan, kiu kompletigas per korektoj kaj aldonoj la tekstolibreton de la kompakta disko.





## Beletra Konkurso

de Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj  
kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo, kune, organizas la Beletan Tradukan Konkurson *José Rodríguez Huertas*.

Regularo

① Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan de originaloj verkitaĵoj en Esperanto.

② Ĉiu konkursanto povos partopreni per tri verkoj maksimume.

③ Ĉiu konkursanto devos sendi tri ekzemplerojn de la traduko per kiu konkursas, tajpitaĵoj en duoblaj interlinioj kaj kun la indiko "Concurso Literario de Traducción *José Rodríguez Huertas*" (Beletra Traduka Konkurso *José Rodríguez Huertas*).

④ Ĉiu verko prezentita al konkurso estu subskribita per pseŭdonimo aŭ moto. Oni akompanu tute fermitan koverton, ene de kiu troviĝu:

Originala titolo de la responda E-verko, ties aŭtoro kaj informo pri la eldono de la tradukitaĵo

Antaŭnomo, nomo, adreso kaj telefonnumero de la tradukinto

Sur la koverto oni skribu la moton aŭ pseŭdonimon de la tradukinto.

⑤ La limtempo de akceptado de la verkoj finos la 31an de oktobro, 1996. Tiurilate la poŝta stampo atestu la daton.

⑥ La verdikto neapelacieblas.

⑦ La 15an de decembro, 1996, oni publikigos la verdikton kaj la juĝantaron.

⑧ Oni devas sendi la verkojn al Sindicato Nacional de Escritores Españoles, Apartado 632, E-29015 Málaga, Hispanio / España.

⑨ La premio konsistas el 20000 pesetoj en E-libroj.

⑩ La livero de la premio okazos la 15an de decembro, 1996, ĉe Liceo de Málaga (Plaza del Carbón 3, 29015 Málaga)

⑪ Se ĝi ŝatas tion, Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj rajtos publikigi la verkon premiitan kaj ĝin posedos. Krome oni registros ĝin kiel proprajn de la responda tradukinto kaj ĉi tiu rajtos enlistiĝi, kiel ordinara membro, en tiu organizo.

⑫ La aŭtoroj de tradukoj nepremiitaj rajtos repreni siajn verkojn ĉe Liceo de Málaga ĝis la 17a de januaro, 1997. Post tiu dato, oni neniigos la tradukojn nereprenitajn kaj ties fermitajn kovertojn.

Málaga, la 5an de februaro, 1996

Emilio Zamanillo, Adjunkta Prezidanto de Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andrés Martín, Prezidanto de Andaluza Esperanto-Unuiĝo.



**e = mc<sup>2</sup>**

*Ĉi foje, nia scienca angulo ne temas pri sciencoj aŭ teknikoj, sed pri ekonomio kaj terminologio. La Eŭropa Unuiĝo decidis pri la nomo de sia futura monunuvo: do estas aktuala temo.*

EKUO aŭ EŬRO, Ĉu Zamenhof pravis?

Ekde antaŭ kelkaj jaroj la tiamaj Eŭropa Ekonomia Komunumo intencis fiksi internacian imagan

monunuon por esprimi tiamaniere la kvanton de la buĝetoj, la ekonomiajn helpojn kaj ĉion rilatan al la ekonomio. Tiel, oni pretendis krei eŭropan propran monunuon sendependa de ĉiuj aliaj naciajn monojn. Ĉi nova *monero* nomiĝis ekde tiam tio mem, t.e. *Eŭropa MonUnuo*, sed kompreneble en la angla lingvo, t.e. *European Currency Unity*, kaj mallongigite ECU, esperantilingve ĝi nomiĝis *ekuo*. Ekde la komenco la nova vorto aperis ofte en la ĵurnaloj kaj kelkaj landoj eĉ stampis la unuajn realajn ekuojn okaze de gravaj eŭropaj eventoj.


En Hispanio kaj en aliaj landoj la nova vorto posedis baldaŭ ekonomian valoron, ĉi tiel la plej gravaj hispanaj ĵurnaloj aperigis la ŝanĝadon de la ekuo en nia lando, do unu ekuo egalas pli malpli al 160 pesetoj. Sed, kompreneble ĉi ĉio marŝis tiamaniere dum Britio estis granda partnero en la Eŭropa Komunumo kaj Usono grava ekstera merkato. Tamen komence de la 90'a jardeko lando reunuiĝis mezeŭrope kaj iĝis la plej forta kerno de la ekonomia internacia organizo, temas kompreneble pri Germanio. Kaj kompreneble ekonomia povo egalas al politika influado kaj ĉi lasta tradukas je lingva hegemonio. Pro tio la nomo de la antaŭtempa netuŝebla ekuo komencis esti diskutata.

Kaj tiam la eŭropaj landoj kunveniĝis en la nederlanda urbo

*[Daŭrigo sur la paĝo 14]*



## Krucvortenigmo



### Horizontale

- 1 Monato  
7 Kiom vi havas?  
9 Monato.  
10 Akiras sciojn.  
12 Poemo destinita esti kantata.  
13 Pronomon.  
14 Ludkarto kun unu sola punkto.  
15 Adverbo.  
17 Kastrita taŭr'.  
19 En ĉiuj participoj aktivaj.  
21 Per forto aŭ minaco forpreni ies

### Vertikale

- 1 Virnomo.  
2 Helena komediverkisto. (10)  
3 Vorto uzata por distingi personon de alia persono.  
4 Miksaĵ' el kunfanditaj metaloj.  
5 Denove (prefikso).  
6 Rando de ŝtofo refaldita kaj kudrita..  
7 ...' al Dio nenio grava okazis.  
8 Verba finaĵo.  
11 Filino de Tantalo.



- posedaĵon.  
22 Grava persono en feŭdisma Japanujo.  
25 De malbona kvalito.  
26 Frukto de arbo simila al la banjano.  
28 Muzika noto.  
29 Odiseo.  
31 Kemia vorto: grupiĝo, en kiu ketona funkcio najbaras duoblan ligan.  
33 Mebl'.  
34 Celo de la futbalistoj.  
35 Detrua dissolv'.  
16 Specio de bovo (formortinta)  
18 Oficiala lingvo de Tanzanio.  
20 Feŭdisma estro en Japanio.  
23 Pronomo.  
24 Teksaĵo el lina kaj aliaj fadenoj.  
27 Ĉu ... aŭ ne...?  
28 Sekv' per la okuloj tekston.  
30 Verda lok' meze de la dezerto.  
32 Konjunkcio.

Denove, la redakcio de *Gazeto Andaluza* prilaboris defion por niaj legantoj: ni esperas ke vi ne trovos ĉi tiun krucvortan enigmon malfacilega, kaj penos atingi premion...

Se vi aŭdacos sendi al ni vian solvon kaj ĝi estos korekta, vi povos gajni libropremion. Sendu vian solvon al la redaktoro (p.k. 5184, 29080 Malaga) antaŭ la 15a de majo, 1996.

Malmultaj legantoj sendis al ni la solvon de la lasta enigmo... ĉu ĝi estis troa por niaj gelegantoj? Diskon de *Solo* (promesitan premion por niaj legantoj) ricevos nia samideano César de Mosteyrin, el Segovio. Dankon al la aliaj partoprenintoj.

Jen la solvo al la krucvortenigmo de *Gazeto Andaluza 44*:





*(Daŭrigo de la paĝo 11)*

Maastricht, la Eŭropa Ekonomia Komunumo malaperis kaj sialoke naskiĝis la Eŭropa Unuiĝo. La landoj kiuj apartenis al ĝi decidis ankaŭ krei monan unuiĝon en fiksota estonteco, kaj tial la nereala ekuo, ĝis tiam nur ekzistanta en la buĝetoj, estus post kelkaj jaroj la sola monunujo de prospera kaj unuigita Eŭropo. La duboj pri la nomo de la monero, ĉefe el la germana kaj franca pozicioj, evidentiĝis. Tial ni atingis la duan duonon de la jaro 95a kiam, sub la prezidanteco de Hispanio, okazis la Konferenco de Madrido kaj unu el la aferoj de ĉi kunveno estus fiksi la definitivan nomon de la estonta eŭropa monunujo. Multaj indikis ke la angla vorto estis la plej konvena, ĉu la angla ne estas jam la internacia lingvo? Multaj eŭropanoj pensis ke ne. Kaj pensante kaj repensante oni eltrovis ke la vorto *euro*, esperantlingve *Eŭro*, estis la komenco de la nomo de nia kontinento en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la Eŭropa Unuiĝo, ĉi tiel: *Europa, Europe...* Do, oni aprobis ke la nomo de la nova eŭropa monunujo estos EURO.

Kaj ĉi ĉio, kiamaniere rilatas al la internacia lingvo Esperanto? Se ni trarigardas la aferon ni eltrovos ĝin facile. Laŭdire ĉiuj kaj ĉiuloke akceptas la anglan kiel internacian lingvon, do multaj personoj decidis iam, laŭdire, forgesi la komunajn elementojn de multaj idiomoj kaj adopti kiel internacian tute nacian lingvon, ĉi tio: la angla. Tamen multfoje kiam oni komencas komunikon kun alilandanoj oni preferas eltrovi tiujn elementojn kiujn ni havas komune.

Antaŭ preskaŭ 110 jaroj pola junulo bone komprenis ke adopti tiun aŭ aliajn nacian lingvon kiel internacian ŝuldiĝas ĉiam al la nedaŭra ekonomia, politika aŭ milita povo. Tamen ni povas pensi ke iam ekzistas tiu internacia lingvo, naskita de komunaj elementoj ĉe multaj idiomoj kaj kie neniu lingvo estas pli grava ol alia. La ekuo orgojle estis super ni dum pli ol 10 jaroj, tamen fine ĝi nomiĝos eŭro, vorto kiun ni konstante menciis sed ni neniam atentis pri ĝi. Kaj kompreneble, pensante kaj repensante, oni eltrovas ke plejeble tiu pola junulo, nomita Lazaro ZAMENHOF, iomete pravis.

J.M.R.H.



## Poezia Angulo

Mia sonĝo ne havas lokon  
por vi. Ne estas loko.  
Ĉio estas sonĝo. Vi fondiĝus.  
Foriru kaj loĝu aliloke,  
vi kiu vivas. Se miaj pensoj  
estus kvazaŭ fero  
aŭ ŝtono, vi restus.  
Sed ili estas fajro kaj nuboj,  
tio kio estis eke la mondo  
kiam neniu loĝis sur ĝi.  
Vi ne povas loĝi. Ne estas loko.  
Miaj sonĝoj bruligos vin.

Miaj grandaj okuloj, tuj apud  
l' aero, estas de l' ĉielo.  
Ili profunde rigardas, min rigardas,  
min interne rigardas.  
Mi cerbumante, senokule,  
kun miaj papelfoj apertitaj,  
tiom da doloro mi kaŝas  
kiom malfeliĉoj mi montras.  
L' aero min rigardas  
kaj ŝi ploras en mia obskura korpo;  
ŝia ploro entombigas sin en mian  
karnon;  
fluas tra mia sango kaj miaj ostoj,  
fariĝas koto kaj radikojn serĉas  
por kreski el la tero.  
Miaj grandaj okuloj, tuj apud  
l' aero, estas de l' Ĉielo.  
En la memoro de l' aero  
restos miaj suferoj.

*Manuel Altolaguirre (Málaga  
1908 - Burgos 1959)*







## Lingva Angulo

### LA AKUZATIVO

Sendube, unu el la aferoj pli komentariitaj de la hispanaj lernantoj de Esperanto estas la uzo de la akuzativo. Tio kompreneblas, ĉar en la kastilia kaj en aliaj hispanaj lingvoj ne ekzistas deklinacio kaj, anstataŭe, oni uzas prepoziciojn kune kun la nomoj, adjektivoj, pronomoj respondaj. Tamen notindas, ke Esperanto ne estas ununura lingvo havanta kazojn kaj, krome, uzi akuzativon favoras la fluidecon de la parolado.

Pro falsa antaŭvidoj kreitaj de la esperantistoj mem, iuj personoj kiuj komencis la lernadon de la lingvo esperante ke ili elregos ĝin senpene, forlasas ties studon konstatinte la specifecon de iuj lingvaj strukturoj. Verŝajne, ili daŭrigus la lernadon de Esperanto se ili estus alproksimiĝintaj al ĝi, puŝite ne de supraĵa scivolemo, sed de kultura, ekonomia, laborista, ktp intereso. Tio pravas, ankoraŭfoje, ke necesas rekonsideri ĝisfunde la strategion de la Movado. Krom la relativa facileco de la lernado de Esperanto, nepras insisti pri aliaj gravaj kaj realaj motivoj (ekonomiaj, politikaj, ktp) pravigantaj la studon de ĉi tiu lingvo. La socio ŝanĝis kaj la Movado devas akordigi sian agadon al la novaj tempoj kaj intereso de la popolo. Tute certe, nek la lernantoj de la araba, nek tiuj de la germana kaj de la greka, nek tiuj de la latina forlasas la klason kaŭze de malfacilaĵoj trovitaj en la respondaj deklinacioj, se ili decidis studi tiujn lingvojn konvinkite pri la certeco de ties aplikado en proksimaj interesaj agadoj realigotaj relative baldaŭ.

#### Kaj kion pri la akuzativo?

Filologoj scias, ke la parolantoj de ajna lingvo emas esprimi kiel eble plej multe da signifo per kiel eble malmulte da fonemoj. Ĉu la uzo de la akuzativo kaj aliaj kazoj ne havigas la eblecon paroli tiel?

Estas personoj opiniantaj, ke Esperanto devenas de la latina lingvo. Parte ili pravas, ĉar en Esperanto troveblas latinaj leksikaj kaj sintaksaj ŝpuroj. Vortoj kiel *apud, inter, per, de, trans, pro, sub, super* kaj *sub* samsignifas en Esperanto kaj en la latina; aliaj, kiel la Esperantaj *preter, hodiaŭ, hieraŭ, ĉirkaŭ, antaŭ* kaj *en* similas al la latinaj *praeter, hodie, heri, circum, circa, ante, in*; aliaj kiel *supra* identas litere kaj malidentas gramatike, ktp, ktp. Cetere, en Esperanto kaj en la latina abundas plurspecaj akuzativoj. Ambaŭ havas la objekton, ekz. *Mi amas patron / Ego amo patrem*. Ankaŭ la direkton, la daŭron kaj la mezur-indikon oni esprimas en ambaŭ lingvoj per akuzativo. Ekz. *Ire Romam / Iri Romon* (direkto), *Multos annos vixit / Li vivis multajn jarojn* (daŭro), *Ambulavit ducentos passus / Piediris ducent paŝojn* (mezur-indiko). En Esperanto

(Daŭrigo sur la paĝo 21)



## 10 sciindaj aspektoj pri Esperanto...

...kaj la Kino

● Verŝajne la plej fama filmo kie aperas la internacia lingvo Esperanto estas *La Granda Diktatoro* de Charles Chaplin. Ĉi tiu filmo estas unu el la plej gravaj sietempaj kritikoj kontraŭ la germana nacionalsocialismo kaj konkrete kontraŭ Adolf Hitler. Chaplin uzas la lingvon Esperanto, kvankam ofte gramatike ne tro korekta, en la afiŝoj de la juda kvartalo kie okazas la filmo. Ĉi tiel oni vidas la vortojn *Lipharoj* en la barbirejo kie laboras la ĉefrolulo aŭ *Terpomoj* en la ĉareto kie la fianĉino de Chaplin vendas terpomojn. Kial Charles Chaplin uzis Esperanton? Laŭdire li pretendis situ la filmon en nekonkrete lando, do li uzis neoficialan lingvon.

● Tamen *La Granda Diktatoro* ne estas la sola filmo kie aperas afiŝojn en Esperanto. En la filmo *Streetfighter 2 (Stratluĝtisto 2)*, kies ĉefrolulo estas la fama belga fortulo Jean Claude Vandamme, aperas afiŝo en la angla, franca kaj en Esperanto. Kial ankaŭ en nia lingvo? Nu, la intrigo de la filmo estas la lukto inter fanatikulo kaj internacia armeo; Alexandru Almasan, membro de UEA, partoprenis kiel aktoro en la filmo kaj proponis al la direktoro aperigi afiŝon en la internacia kazerno ankaŭ en Esperanto, apud la angla kaj la franca, kvazaŭ ĝi estus la oficiala lingvo de la lando kie okazas la filmo.



● Rilate la hispanajn filmojn, krom humora dialogo ĉe la filmo de Marisol *Rumbo a Río*, Esperanto aperas amplekse en la kataluna filmo *La ciutat quemada*. Ĉi filmo rakontas la etoson kaj okazintaĵojn en Katalunio de 1898 ĝis 1909, aperante kelkfoje anarĥisma komunumo kies anoj decidis unuanime lerni Esperanton.

● Tamen ĉiuj opinioj pri la kinarto kaj Esperanto ne estis ĉiam favoraj, la hispana verkisto Ramón Gómez de la Serna verkis en unu el siaj famaj *greguerías* (literatura verkmaniero kreata de li mem konsistanta en esprimoplena sola frazo) "Se imaginan una película en esperanto, sería esperantosa" (Ĉu vi imagas filmon en esperanto, ĝi estus terura [en la hispana lingvo la vortoj esperanto kaj teruro posedas similan prononcon]). Gómez de la Serna diris tion malgraŭ la fakto ke li konis eĉ ne unu vorton pri Esperanto kaj kompreneble li neniam vidis filmon en nia lingvo.



- Ĝis nun la sola filmo produktita originale en Esperanto estas *Angoroj* de Jacques Louis Mahé en 1963. Ĉi krimfilmo, foje ankaŭ humora, estis rolata de aktoroj membroj de la esperantista asocio Internacia Arta Teatro, kaj en kelkaj scenoj ankaŭ aperas aliaj famaj esperantistoj, inter ili ankaŭ akademianoj.
- Se vi volas vidi aktualan hisponon filmon kie aperas juna akademiano de Esperanto vi devas vidi *Sexo Oral (Buŝa Sekso)* de Chus Gutiérrez. Ĉi filmo, kiu neniel rilatas al Esperanto, estas dokumentfilmo kie preskaŭ kvindekda personoj parolas pri siaj spertoj rilate la sekson. Unu el ĝiaj roluloj estas la konata madrida esperantisto Georgo Kamaĉo, kiu aperas surekrane dum pli ol 3 minutoj.
- *The Confidential Agent* estas filmo kie aperas movado tre simila al Esperantismo. Ĉi tiu filmo rakontas la agadon de hispanrespublika spiono kiu kontaktas en Londono kun eksterlanda sekreta inteligenta servo por ricevi helpon por la Hispana Respubliko dum la civila milito. La sidejo de ĉi spionaro estas asocio kiu defendas internacian lingvon nomita *Entrenationo*. Kelkaj vortoj de ĉi lingvo kaj sia delegita reto estas tre similaj al Esperanto-Movado. Sendube Graham Greene, kiu en la jaro 1939 verkis la romanon kiu inspiris la filmon, konis bone Esperanton.
- La videoklipoj estas kvazaŭ la plej junaj fratoj de la kinarto. La unua videoklipo en Esperanto estis produktata de la dana televida kompanio *Oernes* kaj ĝi prezentis dum kvin minutoj la nederlandan rokmuzikan esperantistan ensemblon *Kajto*. Kvankam plejeble la plej mondkonata videoklipo kie aperas Esperanto estas la lasta disko de Michael Jackson *HIStory*, kie oni aŭdas kelkajn frazojn prononcatajn de la aŭskultantaro.
- Kvankam ne ekzistas multaj filmoj originalaj produktataj en Esperanto, ja ekzistas multaj videoj. En 1995 okazis en Brno (Ĉeĥa Respubliko) la unua internacia festivalo de videoj en Esperanto. Pli ol 100 personoj spektis 7 filmojn en nia lingvo. Sciu ke la dua festivalo jam estas preparata.
- Se vi deziras vidi videon kie aperas fragmentojn de filmoj kie oni mencias aŭ aperas la internacian lingvon Esperanto, vi devas spekti la videon *Kinarto kaj Ni*, produktita de Literatura Foiro.

J.M.R.H.

.....

AEU disponas korespondajn kursojn: bazan, mezan kaj superan. Diversaj prezoj, diversaj opcioj. Kaj vi ĉiam havos la helpon de koresponda instruisto. Kontaktu AEU, p.k. 864, 29080 Malago.




## Paĝoj de nia Historio

**Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio**

Komence de la jarcento Esperanto venis ankaŭ en la havenan urbon Ĝibraltaro. Tie, inter siaj diverslokaj enloĝantoj la internacia lingvo ricevis apogon ne nur de la Ĝibraltaranoj mem sed ankaŭ de la koloniaj britaj aŭtoritatoj. En la jaro 1911 la urbo iam havis sufiĉe fortan E-grupon kaj oni ricevis ofte vizitojn de surŝipaj vojaĝantoj kaj de britaj marmilitistoj. Kiel indiko de la internacieco de la Esperanto-Movado de Ĝibraltaro, kaj de la kolonio mem, pruvigas la fakto ke la prezidanto de la societo Sro Hasluck estis britdevena kaj la Vicprezidanto Sro Porral estis hispandevena.

En la jaro 1911 la kunveno de la Ĝibraltara Esperanto Societo pritraktis la viziton de E. Parrish, delegito de UEA en LosAnĝeleso (Usono), kiu planis vojaĝi de Usono ĝis Antverpeno (Belgio) ŝipe propagandigante la internacian lingvon en la lokoj vizitataj, en tiu jaro en Antverpeno okazis la 7a Universala Kongreso de Esperanto. En Junio Parrish vizitis Napolon en Italio kaj Alĝero, tiama franca kolonio, la sekvanta urbo estus Ĝibraltaro, la loka societo planis organizi konferencon kaj postan koncerton. Sed kiam la ŝipo atingis Ĝibraltaron la havenaj aŭtoritatoj ne permesis eniri la ŝipon. Ili konsideris la havenon de Napolo kiel *malpura haveno*, do, se la ŝipo enirus en la ĝibraltara haveno ĝi devus suferi kvarentenon. La ŝipestro decidis daŭrigi la vojaĝon ĝis la brita urbo Southampton.

Ĉiuj planitaj aktoj estis forgesitaj, tamen Charles J. Edward, sekretario de la Ĝibraltara Esperanto Societo kaj delegito de UEA en Ĝibraltaro, stiris ŝipeton kaj iris per pramo laŭflanke de la ŝipo por saluti kaj iamaniere intervjui Sron Parrish. Ambaŭ interbabilis laŭvoĉe en esperanto je la kuriozeco de la aliaj vojaĝantoj de la ŝipo. Sro Parrish klarigis siajn impresojn kaj donis detalojn pri spertoj kun la esperantistaro en la antaŭe vizitataj urboj, promesante reveni post



(Daŭrigo sur la paĝo 4)



## Radioamatora Angulo

### La polarizo

En pasintaj numeroj oni pritraktis la temojn pri la antenoj kaj ĝia atingpovo. Ĉinumere ni vidos aferon rilatan al la anteno kaj al la propagado de la ondoj: la polarizo.

Temas pri la direkto kiu la anteno provokas al la ondoj en la eteron. La ondoj estas polarizataj ĉar la antenoj disradias ilin laŭ konkreta angulo. Tiel se la anteno havas horizontalajn elementojn kiam la ondoj eliras en la eteron, ebla aŭskultanto sukcesos ricevi pli altkvalite se li disponas je anteno ankaŭ kun horizontalaj elementoj: ĉimaniere funkcias la polarizo.

Ni vidos la polarizon de la plej komunaj antenoj:

Anteno *Dipolo*: temas pri dudirekta anteno kiu disradias la ondojn laŭ

perpendikla senco al sia pozicio. konkreta direkto.



Anteno  
*Ground  
Plane*: ĝi  
estas la plej

uzata anteno por la senmovaj stacioj, t.e. ne uzataj ene de aŭtomobiloj. Ĝi posedas du elementojn, unu vertikalan kaj almenaŭ 3 horizontalajn en la bazo.



Anteno *Quad*: ĝi estas formata de diversaj kvadratoj kaj aliaj elementoj de la anteno "yagi". Ĉi du lastaj antenoj ne estas permesataj por stacioj CB.

Anteno por aŭtomobiloj: Ĝi estas tipa anteno kun sola vertikala elemento kiu disradias la ondojn ĉiudirekten.

Ĝi povas mezuri inter 50 kaj 200 cmoj. La plej taga loko por fiksi ĝin estas la supra parto de la aŭto, for de la motoro.



Anteno *Yagi*: Ĝi estas tre simila al la uzataj por ricevi la TV-ondoj ĉe ni mem: temas pri anteno kiu direktigas tre efike la ondoj, kiuj estas disradiitaj laŭ unu



ECB7-I-046745  
STACIO ESPERANTO



[Daŭrigo de la paĝo 7]

homaro, la idealismo de Esperanto fratigas la homojn" estas vortoj, kiuj havas belan muzikon, sed ne ekzistas instrumento en la E-Movado por ĝin ludi. La esperantismo estas lingva movado, lingva movado kiu povas havi grandiozan influon en la mondo. Centoj da problemoj naskiĝas de la lingvo aŭ lingvoj. Sed la esperantismo neniel povos solvi la ekonomiajn problemojn, kaj se jes, ĝi miksiĝus en politiko kaj fakte la esperantismo fariĝus politika partio, aŭ kelkaj politikaj partioj, ĉar jam estas sciata, ke pri politiko ne ĉiuj esperantistoj havas saman opinion.

GA: Jam antaŭlonge Esperanto enradikiĝis en Hispanio. Nun kunvenas fortigi la radikojn, sed kiel?

LS: Jes, sed kompare al la loĝantaro, la enradikiĝo estis sensignifa. Vero estas ankaŭ, ke ni travivas delikatan momenton, do estas necese fortigi nian movadon. Kiamaniere? Se mi havus tiun magian solvon, kreu ke

mi tuj ĝin diskonigus. Mi povas havi ideojn tiurilate, sed solvon ne. Tamen la nura solvo, estas labori, labori kaj labori: ĉiu agu laŭ siaj eblecoj kaj kapabloj, eĉ iom pli, kaj la rezulto estos vere kontentiga.

GA: Nia internacia lingvo naskiĝis por ĉiuj, tamen multaj esperantistoj ankoraŭ agadas neglekte. Kion vi proponas por ŝanĝi tiun situacion?

LS: En la Esperanto-Movado estas du kategorioj. La esperantoj-parolantoj kaj la esperantistoj. La esperanto-parolantoj faras nenion por Esperanto, ili simple parolas Esperanton, sed ne laboras por Esperanto. La esperantistoj estas tiuj, kiuj krome, laboras por Esperanto. La neglekteco estas granda: ĉiam estas unu aŭ du klubanoj kiuj ŝarĝas sur sin la tutan laboron.

Kion mi proponas por ŝanĝi la situacion? Kvankam tio jam dependas de ili mem, konstante instigi ilin al laborado, por ilin konvinki, ke ankoraŭ estas bezonataj la klopodoj de ĉiuj.

.....

[Daŭrigo de la paĝo 16]

eblas meti akuzativon antaŭ infinitivo de subpropozicio, kondiĉe ke la verbo de la ĉefpropozicio estu sensada (ekz. *vidi, aŭdi, aŭskulti, percepti*) aŭ *igi, lasi, helpi, malhelpi*, dum en la latina oni metas akuzativon antaŭ infinitivo de subpropozicio, kiam en la ĉefpropozicio estas verbo de dirado, komprenado, sensado, volado, dezirado, sentado kaj en aliaj okazoj.

Okulfrape evidentas la flueco kaj beleco fontantaj de la uzo de la akuzativo. Kial do la sinteno de iuj dezirantaj forigi tiun kazon? Ĉu subteneblas malfortigi la specifecon de ĉi tiu lingvo? Kaj, cetere, ĉu Esperanto ne estas sufiĉe facila?

ANDRÉS MARTÍN



## La lingvo en la hispana politiko

Per ĉi tiu artikolo mi intencas ĝeni neniu, nek kritiki tiun aŭ alian politikan tendencon, sed nur analizi la influon de la lingvo en la politiko.

Kiam finiĝis la antaŭa frankisma reĝimo, eksplodis grandega entuziasmo de libero, de sendependenco kaj de memregado en ĉiuj hispanaj regionoj. Tiom granda estis tiu entuziasmo, ke naskiĝis la nomata *sistemo aŭtonoma*; ĝi estis la nur rimedo por, almenaŭ iomete, ĉiujn kontentigi kaj bremsi, almenaŭ parte, la grandan deziron de sendependenco. Sed tiu deziro de sendependo precipe estis postulata en tri hispanaj regionoj, en kiuj krom la kastilia aŭ hispana lingvo ankaŭ estis kaj estas parolata aparta lingvo, kiu estas propra de la regiono, kaj kiu en la frankisma epoko estis bremsata de la oficialaj instancoj.

Se ni aplikas tiun decidon de la hispana popolo, nepre ni devas fari la jenan demandon, laŭ lingva vidpunkto, kial tiu postulo de aŭtonomeco aŭ sendependeco estis ege forta en tiuj regionoj, en kiuj, kiel dirite supre, krom la hispana, estas parolata alia propra lingvo? Kio estus okazinta se en la tuta teritorio hispana, estus parolata nur unu lingvo, ĉu kastilia aŭ kiu ajn? Ĉu la postuloj pri aŭtonomeco kaj sendependeco ankaŭ estus okazintaj? Kompreneble, ĉiu devas respondi al si mem tiujn demandojn. Mi sincere pensa, ke ne, ke tiu deziro de aŭtonomeco ne estus okazinta, kio signifus la eviton de multaj konfliktoj.

Vi jam scias, kio okazis, nome, ĉiu hispana regiono postulis ankaŭ *sian* aŭtonomecon kaj en multaj kazoj oni aludis, ĉar mankis la argumento de la lingvo kaj la aŭtoktona kulturo, al historiaj okazintaĵoj de antaŭ kelkaj centoj de jaroj, kaj kiuj havas nenan rilaton al la nuna kaj moderna vivoformo en Hispanujo. Kvankam mi ankaŭ havas mian propran opinionon, mi preferas ĝin meti flanken, ĉar ne estas mia intenco politikumi, sed iomete tre supraĵe analizi la influon de la lingvo en la vivo de la homo.

Ĉu tiom granda estas tiu influo, ke la homoj parolantaj saman lingvon propre ili sin jam konsideras popolo? Ĉu la lingvo tiom forte povas unuigi la homojn? Ĉu ĉi tiu koncepto de vivo estas ĝusta? Ĉu tiom granda estas la povo de lingvo? Ĉu la parolado de malsama lingvo devas meti barojn inter la homoj? Jes, oni povas diri al mi, ke starigo de ŝtato en kiu oni parolas nur unu lingvon ne signifas meti barojn nek malamikecon kun najbaroj, kiuj parolas aliajn lingvojn, kaj ke la rilatoj povas esti bonegaj. Jes, tio ankaŭ estas vero, sed la starigo de ŝtato jam signifas krei limojn kun aliaj ŝtatoj, kaj en ĉi tiu kazo, kiun ni pritraktas ĉi tie, la lingvo estas la ĉefa rolanto. Nedisputeble estas, ke en nia lando la lingvo aŭ lingvoj havis kaj havas gravan influon en la enlanda politiko.



Nun mi prezentas al vi alian supozon pri la rolo de la lingvo en nia lando. Kio estus okazinta, se kiam eksplodis tiu entuziasmo pri sendependeco, jam supre aludita, en Hispanujo regus en plena potenco internacia lingvo - Esperanto kompreneble? Ĉu tiuj regionoj kun propra lingvo ankaŭ estus postulantaj tiun aŭtonomecon? Kaj ĝuste kia estas la rolo, en ĉi tiuj kazoj, de la lingvo internacia? Ni supozu, ke en la frankisma epoko, Esperanto estas aplikata en plena ĉiutaga vivo, kaj ke uzado de minoritataj lingvoj troviĝas en ĝusta praktikado, kaj ke tiurilate ekzistas nenia problemo, ĉu la ŝanĝo politika al sistemo demokrata, ankaŭ signifus la postulon de propra aŭtonomeco, ĉar tie estis parolata alia lingvo? La respondo estas tikla kaj malfacila. Sed en mia opinio, la postulo de propra lando, ĉar oni havas propran lingvon, ne plu estus valida.

Kiam mi redaktas ĉi tiun artikolon, en Katalunujo ni troviĝas en plena

kampanjo por aŭtonoma balotado (novembro 1995). Nu, mi konstatis, ke estas iuj grupoj, kiuj havas, kiel ĉefan sloganon kaj politikon la lingvan problemon. Kio estus okazinta, se tiu lingva problemo ne ekzistus? Ĉu ankaŭ ne ekzistus tiuj sendependemaj politikaj grupoj? Malantaŭ la lingvo oni kreas multajn aliajn konceptojn, kiuj tuŝas nian ĉiutagan vivon (ne nur en Katalunujo) sed en kiu ajn lando de la mondo, kie ekzistas lingvaj problemoj. Post la lingvo venas la nacieco, kiu ankaŭ helpas al miskompreno inter la diversaj popoloj uzantaj malsamajn lingvojn.

En ĉi tiu kompleksa mondo de lingvoj, naciecoj kaj ekonomiaj rilatoj, kia estas la rolo de neŭtrala internacia lingvo? Ĉu iam ni kapablos oficialigi nian lingvon? Ĉu tiuj naciistoj, kiuj batalas por sia lingvo, ankaŭ rezignos sian agadon, kiam internacia lingvo egaligos ĉiujn lingvojn? Kaj tiuj normoj aŭ opinioj miaj ne celas



Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluzia* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzio. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota) aŭ klare tajpita.



nur la minoritatajn lingvojn, sed ankaŭ la multnombre parolatajn lingvojn. Ĉu ili rezignos sian rolon en la mondo, en la internacia politiko, ekonomio, kulturo, pro la fakto, ke internacia lingvo jam egaligis samarajte ĉiujn lingvojn? La vero estas, ke la lingva problemo, en mia opinio (kaj vi jam rajtas havi aliajn opiniojn) estis aŭ estas la ĉefa kaŭzo de la politika strukturado en la nuna Hispanujo. Ni supozu ankaŭ (ni

## Esperanto Aplikata

Ĉi tie oni povus legi VIAN anoncon. SENPAGE. Aŭ tiun de viaj amikoj, najbaroj... Simple skribu leteron al ni, kaj via anonceto aperos en nia venonta *Gazeto Andaluza*.

● Komerca firmao *La Espero* ofertas kunlaboron kun la Ĉeĥa Komerca Ĉambro. *La Espero*, P.S. 34, CZ-696 62 Strážnice, okres Hodonín, Ĉeĥa Respubliko. Telef./Faks. 42-631-322079.

● Chizhou Internacia Turisma kaj Konsultiĝa Kompanio, registrita ĉe Ĉina Ŝtata Turisma Administracio volonte servas al turistoj en Ĉinio: selektante vojaĝprogramoj en Ĉinio, mendante hotelajn ĉambrojn en

revu iometel), ke subite oni akceptas internacian lingvon por la tuta hispana teritorio, ĉu tiu sistemo de aŭtonomioj plue estus valida, kiacele? Ĉu nur por administrado?

Vi povas konstati, ke la vojo de Esperanto, por atingi la sopiratan triumfon estas plena de dornoj kaj malfacilaĵoj, kiuj restas for de nia bona intenco: ESPERANTO POR ĈIUJI

LUIS SERRANO PÉREZ

ĉinaj hoteloj, mendante flugbiletojn, aranĝante studadon en ĉinaj altlernejoj... 15W. Qiupu Road, Guichi, Anhui, Ĉinio.

● ESPERTUR. Vojaĝoficejo *Esperetur* specialiĝis por kontentigi la turismajn bezonojn de esperanto-parolantoj. Vojaĝoficejo *Esperetur*, kunlabore kun Hungaria Esperanto-Asocio. 1061 Budapest, Kenyérmező u. 2. Tel. (36-1)268-03-06. Retadreso: eventoj@odin.net.

● La ĉina peranto de IKEF, WANG Tianyi, regule eldonas la Esperanto-Ĉinlingvan informilon monatan *Bulteno de Esperanta Komercio (BEK)*, kiun uzas ĉ. 350 geesperantistoj tra Ĉinio, kelkaj E-komercistoj en Japanio, Koreio, Hongkongo, Tajvano, Malezio... *BEK* ĉiam bonvenigas kaj senpage



aperigas viajn ofertojn kaj ideojn. WAMG Tianyi ofertas materialojn por industrioj medikamenta kaj kemia, diversajn ĉinajn varojn... WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an, Ĉinio.

● Anhui Internacia Konsulta Kompanio *Paco* estas preta peri por geesperantistoj en aliaj landoj. S-ro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230051 Hefei, Anhui, Ĉinio.

● Proponas al nutraĵfirmoj freŝajn tropikajn fruktojn kaj legomojn, i.a., ananasojn, citronojn, tomatojn, oranĝojn, kafon, teon... S-ro Epa Ngirum B., c/o Tothman Peggy, Box 1848, Mwanzo, Tanzanio.

● AERA. Por defendi la interesojn de tutmondaj radioaŭskultantoj. Por kontribui al progreso de parola Esperanto-kulturo. Por esti regule informita pri frekvencoj kaj adresoj de radio-stacioj. Por disvolvigi rilatojn inter radiofonia kaj gazetaro. Petu dosieron per simpla letero al Bruno MASALA - AERA, 2 rue des Vignes, F-57530 Coincy, Francio.

● Ĉinaj geesperantistoj serĉas laboron eksterlande. Kontakti s-ron Ĉielismo Von, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an, Ĉinio.

● Tradukprogramo al 39 lingvoj *Athena* (por Windows-komputiloj) printempe de 1996 publikigos

Gerard van Wilgen, Nederlando. Ideoj pri distribua metodo aŭ infompetoj bonvenas ĉe la aŭtoro. Retadreso:

Gvwilgen@worldaccess.nl.

●● Ellaborado de fadenoj kaj ŝpinaĵoj el diversaj sintezaj fibroj. Ŝnuroj: ĉiaj metodaj kvalitaj retoj por fiŝkaptado. Adreso: Redesmar, S.A., Apartado nº 2, 03360 Callosa de Segura (Alicante), Hispanio. Teleg. Redesmar; Telex 63380 TOLU; fax (96) 5310384.

●● Fabriko ellaboranta naturajn kaj sintezajn fibrojn. Ŝnuroj kaj fadenoj el agavo, kanabo kaj aliaj fibroj taŭgaj por agrikultura kaj industria bezonoj. Adreso: Rafia y Sisal, S.A., Apartado 20, 03360 Callosa de Segura (Alicante), Hispanio. Telefono: (96)5312446; fax (96)5310441; teleg. MABELO.

●● Aŭtomata traduksistemo *Proton-S* (angla-rusa) jam ekzistas. Eblas ellabori variantojn: angla-esperanta kaj esperanta-rusa. Bezonata labortempo: 2 monatoj, sed necesas trovi sponsoron kiu antaŭpagas 50%. Prezo angla-esperanta: 1500 USD, esperanta-rusa: 200 USD. Sponsoro ricevas disketojn kaj rajtas libere vendi kopiojn. N.N. Mihailenko, a/ja 110, RUS-109280 MOSKVO (Rusio), retpoŝto:



Nick\_Mikhailenko@p12.f135.n50  
20.z2.gate.phantom.msk.su.

●● Herbalife-produktoj unue purigas homan organismon de ĉio malbona, due nutrigas homajn ĉelojn kaj trie defendas homan organismon de ĉio malbona kio troviĝas en kutima ordinara manĝaĵo. Antaŭnelonge Herbalife ankaŭ komencis produkti kaj vendi pere de la distribuantoj altkvalitajn kosmetikaĵojn kaj parfumaĵojn. Pli ol 30 esperantistoj el diversaj landoj aktivis en Prospero. Se vin interesas gajni monon vendante Herbalife-produktojn turnu vin al Prospero (Internacia Rondo Esperantista), POB 5671, Stockholm, 114 86 Svedio.

●● *Juna Amiko*. Internacia Kvaronjara Lernejana Revuo en Esperanto, revuo por lernejanaj kaj komencantoj. Abonprezo ĉe UEA, 19 NLG.

●● Resaniga magneta bendo kontraŭ ostosprono, surbaze de moderna scienco kaj tradiciaj ĉinaj popolmedikamentoj serĉas kunlaboranton por vastigi produktskalon. S-ro Gao Chongcai, 14-34 hao, Piaotun jie, Wuanghua-gu, CN-113001 Fushun, Liaoning (ĈINIO); tel. oficeje 6681413 kaj 7687023, hejme 2332167

●● La Kosmologio de Martinus. Logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno - kaj al pacoj

kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo *Kosmos*. Petu senkoston provkzempleron ĉe Martinus-Instituto, Marindalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio.

●● Hungaria Esperantista Semajno. Budapeŝt, 29-jun-96 / 05-jul. Hungaria Esperantista Semajno konsistas el 4 ĉefaj programoj: Konferenco pri *Turismo kaj Komunikado*; artaj prezentadoj en esperanto; turismado en Hungario kaj lingvokurso por komencantoj kaj progresantoj. Turnu vin al Hungaria Esperanto-Asocio, H-1061 Budapeŝt, Andrásy út 27, Hungario. Tel. (36-1)268-03-06.

●● Andaluza Esperanto-Unuiĝo proponas al vi:

-*Pandemonio*, aro da rakontoj de junaj hispanaj aŭtoroj (500 pesetoj)

-*Solo*. Disko de malaga esperantista muzikisto, ±25 minuta (500 pesetoj).

-*Aŭkcio de vivoj* (Lukiano), 12 paĝa broŝuro. Lukiano ridigas la helenajn diojn. (200 pesetoj)

-*Esperanta Kurso Baza por PC-komputiloj*. (1000 pesetoj)

Plus sendokostoj. AEU, p.k. 864, 29080 Malago.

(daŭrigo de la lasta paĝo)

10. La Konsilio petas la Komisionon preni en konsideron la lingvan diversecon kaj plurlingvecon en la ellaborado kaj realigado de Komunumaj politikoj kaj agadoj.

11. La Konsilio petas la Komisionon inventari kaj pritaksi la politikojn kaj agadojn de la Komunumo kiuj prenas en konsideron lingvan diversecon kaj plurlingvecon kaj raportu al la Konsilio en templa de unu jaro.

12. La Konsilio petas la Komisionon starigi grupon de reprezentantoj nomitaj de la Membro-Ŝtatoj kun la tasko, sen damaĝo al la agado de ekzistantaj komitatoj kaj en kunlaboro kun ili, priatenti la konsideradon de la lingva diverseco kaj la antaŭenigon de plurlingveco en la politikoj kaj agadoj de la Unio, kun respekto al la naciaj politikoj de la Membro-Ŝtatoj.

13. La Konsilio aldone reatentigas pri la graveco kiun ĝi donas al la egaleco de la oficialaj lingvoj kaj la laborlingvoj en la institucioj de la Unio, nome la germana, la franca, la itala, la nederlanda, la angla, la dana, la greka, la hispana, la portugala, la finna kaj la sveda, konforme al Reglamente 1/58 tia kia ĝi estas modifita, fiksanta la lingvan sistemon aplikendan en la institucioj de la Unio. La Konsilio reatentigas pri la aparta statuso de la irlandia lingvo laŭ artikolo 5 de la Traktato pri la Eŭropa Unio kaj laŭ la Traktato pri la aliĝo de Danio, Irlando kaj la Unuiĝinta Reĝlando.

(Laŭ traduko de Brian Moon, aperinta en ESPERANTO, n-ro 1075 (11), novembro, 1995.)

-----  
Noto de la Redakcio.-

Pri ĉi tiuj konkludoj de la Konsilio de EU, la Redakcio de ESPERANTO, en la menciita numero, paĝo 185, inter alie diras:

"Ni povas nur konsenti kun ĝiaj konkludoj kiam temas pri la valoro kaj konservindeco de la plurlingva stato en Eŭropo. Sed duboj povas trafi la indikitajn rimedojn de konservado: ĉu edukprogramoj (1) kaj nove kreataj laborpostenoj (2) sufiĉos por gardi la diversecon kiam similaj streboj ĝisanunaj nur helpis forigi la pozicion de "grandaj" lingvoj? Kaj eĉ se la oficialaj lingvoj (13) ĝuas efektive egalan statuson, ĉu tio sufiĉos por ke ĉiuj EU-civitanoj, ankaŭ tiuj parolantaj aliajn lingvojn, "havu egalan aliron al informoj" (6)? La demandoj multas. Al ili ne ekzistas unusola kaj ĉiosolva respondo, ankaŭ ne ĉe esperantistoj - sed nia lingvo estas mem propono, kiun oni devus preni en konsideron. (Cetero, la laborgrupo kies starigon petas (12), ĝis nun ne estas establita.)"

Kompreneble, la pozicio de la Redakcio de GAZETO ANDALUZZIA kaj de la Estraro de AEU tute egalas al tiu de la Redakcio de ESPERANTO.

## KONKLUDOJ DE LA KONSILIO PRI LINGVA DIVERSECO KAJ PLURLINGVECO EN

### LA EŬROPA UNIO

1. La Konsilio konfirmas la gravecon por la Unio de ĝia lingva diverseco, kiu estas esenca elemento de la eŭropaj dimensio kaj identeco kaj de la komuna kultura heredaĵo.
2. Ĝi substrekas la demokratiajn, kulturajn, sociajn kaj ankaŭ ekonomiajn implicojn de tiu diverseco. La lingva diverseco ankaŭ kreas laborpostenojn kaj aktivadojn kaj estas integriga faktoro. Ĝi estas avantaĝo por la ekstera disradiado de la Unio, ĉar plej multaj el la lingvoj de la Eŭropa Unio estas uzataj en granda nombro da eksteruniaj landoj.
3. La Konsilio konsideras ke la evoluo de la inform-socio prezentas novajn ŝancojn kaj novajn defiojn por plurlingveco kaj lingva diverseco.
4. Lingva diverseco estas komponanto de la nacia kaj regiona diverseco de la Membro-Ŝtatoj kiun mencias Artikolo 128 de la Traktato. La Komunumo devas preni ĝin en konsideron en sia agado laŭ aliaj dispozicioj de la Traktato, inkluzive Artikolojn 126 kaj 127, kiuj rilatas al edukado, profesia klerigado kaj junularo.
5. La Konsilio emfazas ke necesas konservi la lingvan diversecon kaj antaŭenigi plurlingvecon en la Unio, kun egala respekto al la lingvoj de la Unio kaj konforme al la principo de subsidiareco.
6. Por ke la civitanoj subtenu la konstruadon de Eŭropo necesas garantio ke la lingvoj de la Unio estos prenataj en konsideron kaj ke ĉiuj havos egalan aliron al informoj, konforme al la nacia juro de la Membro-Ŝtatoj kaj kun respekto al la Komunuma juro.
7. Tiurilate la Konsilio bonvenigas precipe la rezolucion de la Konsilio de la 31-a de marto 1995 pri la kvalita plibonigo kaj la diversigo de la lernado kaj instruado de lingvoj en la eduksistemoj de la Eŭropa Unio kaj la alprenado de la programoj Socrates, Leonardo kaj Junularo por Eŭropo.
8. Ĝi ankaŭ notas la intencion de la Komisiono prezenti, laŭ peto de la Eŭropa Konsilio en Kerkiro, komunikon pri la lingvaj aspektoj de la informsocio, senprokraste ekzamenotan de ĝi.
9. La Konsilio emfazas la gravecon kiun ĝi donas al tio, ke la lingva dimensio estas prenata en konsideron en la eksteraj rilatoj de la Unio, precipe en la kadro de programoj de la Unio kiuj tuŝas neuniajn landojn.

(pluas sur la antaŭa flanko)